

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44300 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1988 - 4

(OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... Nigra Falko, grafo de Anĵuo...



... kaj pri Albert CAMUS.

KULTURAJ KAJEROJ

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent B.P. 54
49150-Baugé

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot


ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la mondo (Frangeul)	2
Nigra Falko (B. Cheverry)	3-4
Pri la blinduloj (S. Boniol)	5-6
Albert Camus (M.T.Juchault,D.Levy	7-8
Proverbaj fiŝoj (B. Golden)	9-10
Paĝo de la geknaboj (Onklino Gina)	11
La ŝnureto (R. Dupuis)	12-13
Por via distro (C. Cavalié)	14
La vivo en Gresillon	15-16

El Grésillon

La lasta frazo de la sampaĝa artikolo en la antaŭa numero de Kulturaj Kajeroj estis:" Pli mankas homoj ol mono". Fakte estas necese kompletigi ĝin aldonante: homoj "pretaj helpi", dum la tuta jaro kompreneble, sed ankaŭ dum la staĝoj. Kiam la tutjaraj respondeculoj subite konstatas , ke ili respondecos ankaŭ pri preskaŭ ĉiuj staĝoj en la somero, ili sentas la ŝarĝon iom tro peza. La dumsomera respondeco postulas laboron. Sed nur pro tro longa deĵoro tiu laboro foje lacigas. Estas necese dispartigi ĝin en pluraj periodoj kun diversaj respondeculoj. Ĝi ne estas malfacila sed ĝi postulas ŝaton de la rilatoj kun aliaj homoj. La estrado en la kuirejo estas tute ne malfacila, se konsideri, ke la kuiristino kaj la helpantinoj estas tre seriozaj kaj laboras en Gresillon jam de multaj jaroj. Por la venonta somero pluraj geamikoj anoncis, ke ili ĉeestos kaj samtempe "lernos" la estradon de la someraj staĝoj. Kuraĝiga estas tio por le estonto. Sed ĉu plilongiĝos la listo ?

La homoj kapablaj prizorgi la administradon de la Esperanto-Domo ekzistas, sed ili hezitas. Ĉu ne valoras iom da peno la Kultura Domo, kiu dum 36 jaroj alportis gravan helpon al la esperantistoj kaj gravan "pluson" al la disfamiĝo de Esperanto, al la plulernado de la lingvo kaj, pere de ĝi, al la pliriĉiĝo de vi ĉiuj?



Feliĉan Novjaron

Esperanto tra la Mondo

DEKLARACIO KONIGENDA AL LA PUBLIKO- Okaze de la universala kongreso en Roterdamo, la membroj de la Honora Patrona Komitato subskribis komunan deklaracion pri esperanto publikigitan en "Esperanto" de septembro. Pro la personeco kaj titoloj de la elstaraj subskribintoj tiu deklaracio meritas disvastigon en la ĝenerala publiko. Traduku kaj publikigu!

EL ĈINIO- Post la konferenco pri uzado de esperanto en sciencoj kaj teknikoj, kiu kunigis 1 500 partoprenantojn lastan someron en Beijing, oni nun anoncas, ke la ĉina Akademio de Sciencoj planas krei internacian universitaton pri scienco kaj tekniko, kies nura studlingvo estus Esperanto. Estus grave, ke seriozaj interesitaj personoj skribu al: Academia Sinica, Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio, 52 Sanlihe, 100864 Beijing.

Lasttempe estis prezentitaj en Ĉinio televidfilmoj celantaj la lernadon de esperanto. En Ĉingdaŭ tia filmo titolita "La Espero", nombras 24 lecionojn. En Ŝenjang la televida filmo konsistas el 50 lecionoj de po 25 minutoj.

EL SOVET-UNIO - La 2-a Internacia Esperantista Junulara Tendaro okazos en Minsk, ĉefurbo de Bielorusio, de la 29-a de marto ĝis la 5-a de aprilo 1989. Informas: Junulara Komisiono, Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, prosp. Kalinina 14, SU-103885 Moskvo-H-9, Sovetunio.

"Komsolskaja Pravda" anoncis, ke en la urbo Kazan, strato Jdanov renomiĝis strato Esperanto, kiel antaŭ la stalinaj persekutoj.

FRANCE-URSS - Por eventuala kunordigita agado sine de la asocio, la francaj geesperantistoj, membroj de " France-URSS" estas invitataj skribi al: André Frangeul, 6, rue du Buis, la Roseraie, 49000 Angers. (laŭbezone indiku vian funkcion en la asocio).

KONGRESOJ-RENKONTOJ - La temo de la universala kongreso de UEA en Brighton (29/7-5/8) estos " Esperanto, kiel ilo por la paca edukado".

-769 junaj esperantistoj el 46 landoj partoprenis en la 44-a Internacia Junulara Kongreso en Zagreb. La 45-a kongreso okazos en Kerkrade, Nederlando, de la 16-a ĝis la 23-a de julio, pri la temo "Transporto".

-De la 20-a ĝis la 24-a de septembro 89 okazos en Lugano, Svislando, la kvara mondkongreso pri psikiatrio de la unua infanaĝo kaj prikoncernaj sciencoj. Apartenas al la estraro tre konataj diverslandaj specialistoj. La mondkongreso estos dediĉata al "Novaj Orientiĝoj pri la Unua Infanaĝo" kaj aliaj temoj. La oficialaj lingvoj estos la franca, la angla kaj la itala. Estus interese se partoprenus ankaŭ esperanto-parolantaj kongresanoj ĉar eblus organizi por ili ion specialan. Petu informojn de: D-ro Tazio Carlevaro via A. Di Sacco 6, CH-6500 Bellinzona Svislando.

-La franca Kongreso de esperanto okazos en Vichy (12-15/5-89).

-La Kongreso de SAT-Amikaro okazos en Pezenas, Herault de la 25-a ĝis la 28-a de marto 1989.

-La fervojistoj kunvenos en Salu (Hispanio) por sia Internacia Kongreso (13-19/5-89).

-Intensaj kursoj okazos en Agde, 2km. de la Mediteraneo, de la 3-a ĝis la 7-a de majo. Informas: Esperanto, 9 rue Georges Picot, 34500 Beziers.

SEMINARIO "EUROGENERACIO" - Organizita de TEJO kaj JEFO, ĝi okazos en la Esperanto-Domo Gresillon de la 24-a ĝis la 29-a de marto. Laborlingvoj: esperanto kaj franca. Informas: Aline Boulet, 8, villa Stendhal, 75020 Paris. Okazos prelegoj, debatoj, ekskursoj kaj ĵazkoncerto.

NIGRA FALKO

GRAFO DE ANĴUO

En la urbeto Baugé, apud Grêsillon ekzistas bulvardo Foulques-Nera (Nigra Falko). Tiu Nigra-Falko, estro de la provinco Anĵuo vivis antaŭ mil jaroj. Lia oficiala baptonomo estis Godfredo. Historiistoj diras, ke tiu flank-nomo venas de la franca vorto "faucon" (falko), speco de rabobirdo. Verŝajne temis pri la akvo-falko, kutima loĝanto de la Loire-marĉoj. Armita per forta beko kaj pikaj ungegoj la virbirdo difinis por si kaj sia familio propran teritorion el kiu li forpelis la aliajn akvobirdojn. La tiama mastro de Anĵuo, nigraharulo rajdanta nigran ĉevalon, vestita per nigra kiraso, konstante batalis kontraŭ siaj najbaroj. Li estis inda je sia kromnomo. De tempo al tempo li sincere deziris pentofari: kvarfoje li iris al Jerusalemo. La provinco Anĵuo ja ŝuldis al li sian potencon. La Nigra Falko estis la praavo de reganta familio, kies sinsekvaj membroj iĝis famuloj laŭlonge de la jarcentoj. Li estis la praulo de multaj nuntempaj reĝoj aŭ princoj en Eŭropo.

Kiam mortis lia patro, li estis 17-jaraĝa. Lia fratino delonge edziniĝis al Konan, grafo de Bretonio, malamika najbaro de Anĵuo. La bofrato deziris mortigi Nigra- Falkon por heredi la graflandon Anĵuo. Por kontraŭstari al la planoj de Konan, Nigra Falko edziĝis al juna kuzino, filino de la grafo de Vendôme, preĝante, por ke ŝi nasku filon.

Intertempe vokita de la reĝo de Francio al Orleans, samtempe kiel multaj aliaj reĝaj vasaloj, el kiuj Konan, li estis devigata forlasi la edzinon. En Orleans, li estis hazarde informita, ke Konan komisiis siajn kvar filojn ataki Angers. Tuj Nigra Falko rajdis al sia urbo por savi ĝin, la graflandon, la edzinon kaj la naskiĝontan infanon. Li sukcesis, masakrante la pli multon el la malamikoj. Li revenis al Orleans rajdante la blankan ĉevalon de unu el la filoj de Konan. La reĝo agnoskis la rajton de Nigra Falko sed ordonis, ke la du bofratoj interpaciĝu.

Nigra Falko senpacience atendis la naskiĝon de sia filo. Sed naskiĝis filino. La patro rifuzis vidi la infanon kaj ankaŭ la patrinon. Tuj post la festoj, li denove forlasis sian edzinon por iri batali kun la Perigorda Grafo kontraŭ la Potevianoj. Poste li venis al Tours, kiu apartenis al la grafo de Blois kaj konkeris la urbon. Li volis trairi ĉiujn stratojn de la urbo kaj eniris la bazilikon Sankta-Marteno rajdante. Sakrilegio! Li estis devigata agnoski sian kulpon sed la loĝantoj atendis la okazon sin venĝi. Dum foresto de Nigra Falko ili revokis la grafon de Blois, kiu reprenis la urbon kaj incendiis la bazilikon.

Dume, Anĵuo estis bone estrita de la grafino Elizabeta kaj de guberniestro. Nigra Falko batalis kontraŭ la Bretonia Grafo, venkis sed perdis Turanĝion: la grafo de tiu provinco mortis kaj la filo de la mortinta franca reĝo edziniĝis la vidvan grafinon! Denove Nigra Falko forlasis sian edzinon en soleco por viziti siajn vasalojn. Sed survoje, strangaj mienoj de la akompanantoj dubigis lin pri la honesta konduto de la grafino. Li revenis kaj submetis ŝin al la "Dia juĝo". Ŝi devis salti de la supro de la plej alta turo de la kastelo en la suban riveron. Dio juĝis! Miraklo! Elizabeta estis savata dank'al vepro. La edzo ne volis kredi je la senkulpeco de la edzino. Li decidis plian provon. Oni starigis ŝin sur ŝtiparo, sur la placo antaŭ la pordego de la katedralo. " Kion akvo ne diris, tion diros fajro!" La grafino mortis meze de la flamoj. Sed subita forta vento blovis la flamojn al la proksimaj ligno-domoj kaj la tuta urbo brulis!

Poste Nigra Falko edziĝis al la fratino de forpasinta malamiko,

antaùa grafo de Blois. Tiu dua edzino ne havis la tempon naski infanon: ŝi mortis neatendite, kiam Nigra Falko estis ekironta al Jerusalemo, okaze de la dua kruca militiro. Li devis trovi trian edzinon. Tutan jaron oni serĉis la "perlon". Ŝia nomo estis Hildegarda, dudekjara junulino. La Anĵuanoj tuj tre amis ŝin.

Nigra Falko denove iris al Jerusalemo, vestita per pento-robo, kun ŝnuro ĉe la tajlo kaj bastono ĉemane... sed ankaŭ kun multaj kavaliroj, kiuj portis la provianton. Li iris tra Romo.

Revenante, post plurmonata foresto, li retrovis sian edzinon kun plezuro. Filo naskiĝis. En 1014 li decidis iri denove al Jerusalemo, sed pli rapide, t.e. perŝipe de Marsejlo. Reveninte la anĵua grafo konstruigis la abatejon Sankta Nikolao en Angers kaj plurajn fortikaĵojn, el kiuj unu en Baugé.

Nigra Falko daŭre estis freneze ĵaluza. Hildegarda, aroganta, sin ĵetis en la riveron de la supro de la kastelo kriante:" Dio juĝos!" Mirakle, ŝi ne suferis de la falo. La akvo kunportis ŝin al la kontraŭa bordo de la rivero, kie ŝin retenis densa vepraro, meze de kiu ŝi malkovris malnovan virgulinan statueton el nigrigita kupro. Nigra Falko suferis pro tiu faro de lia edzino, pri kies fideleco li ne plu rajtis dubi. Dankeme li konstruigis novan abatejon, kies supro videblas nuntempe en la Supera Lernejo de Artoj kaj Metioj, en Angers.


Dum iu foresto de la patro, la filo de Nigra Falko, spite al la patra volo, edziĝis al Agnesa de Burgonjo, juna vidvino de la grafo de Poitiers. Falko tamen iris denove al Jerusalemo kun Roberto la Diablo, duko de Normandio, kiu havis multon por pripenti. Dum la vojaĝo de la patro ,la filo bone zorgis pri la provincaj aferoj kaj rifuzis rezigni pri sia nova rolo, kiam revenis Falko. Tiu ĉi venkis, sed sentante la maljuniĝon decidis redoni al la filo ĉiujn feŭdajn povojn. Li mortis en la lorena urbo Metz preparante novan vojaĝon al Jerusalemo.

Dum kvindek tri jaroj Nigra Falko estris la grafan landon Anĵuo. Spuroj restas, kiuj atestas lian tiaman imponecon. La filo montris saman dignan aŭtoritatecon dum nur dudek jaroj.

El prelego farita en

Grésillon de B. Cheverry

****



al P. Babin, poŝtkonto Nantes 281361L

aŭ al via peranto:vidu liston sur la paĝo

ATENTU: Nova Tarifo: 70 fr.fk.

La blinduloj en la antikva socio (2)

* * * *

Eksteraĵo de la blinduloj- Malmultaj informoj troveblas pri la eksteraĵo de la blinduloj en Antikveco. Tamen la atestantoj ilin priskribas al ni vagantaj, la vojon al si palpe serĉantaj; tiel estis en Ugarit (Izraela lando), (Readmono, 28-29; Jesajo 59-10), kaj en Helenio (Sofoklo, "Edipo Reĝo"), kie kroma bastono estis uzata. Foje gvidanton ili havis: Tirezio, la divenisto, estas al ni priskribita gvidata de infano aŭ knabineto, kiun li titolas "la okulo de mia blinda piedo". Koncerne blindiĝintan Edipon, Sofoklo lin prezentas al ni gvidata de la filino de Antigona.

Pro manko de antikvaj pli precizaj priskriboj, la atesto de Ernst J. Christoffel, ja freŝdata, sed kolektita dum cirkonstancoj tre proksimaj al la antikvaj kondiĉoj, helpos nin al pli ĝusta percepto de la blindulo tia, kia li supozeble aspektis en la por ni interesa kunteksto. En julio 1914, Christoffel estis en Germi (turka imperio). Jen kiel li raportas pri sia renkontiĝo kun iu blindulo, Rasul laŭnome.

"Mi sidadis kontraŭ la tendo kaj observis lin venantan. Per longa bastono li esploris al si la vojon. Nudpieda li estis kaj havis nur ĉemizon de zono firmtenatan. La kapo estis vestita de blanka trikita ĉapo simila al tiuj de la kurdaj infanoj surhavataj. Longa hararo kovris la frunton. Lia plaĉa vizaĝo tamen eksterigis neesprimeblan malgajon, el lia tuta aspekto mizero eksteriĝis; sur lia infaneca vizaĝo signoj pri suferado atestis, ke li neniam spertis amon kaj ke ene, eble nekonscie, tian vundon li sentadis. "Kie estas ciaj gepatroj?"-"Mortintaj. Mi neniam konis ilin."-"Ĉu parencaron ci havas?"-"Ne Sinjoro."-"De kiam ci estas blinda?"-"Mi nescias. La lumon mi neniam vidis."-"Kiamaniere ci vivtenas cin?"-"Mi faras monkolekton."-"Ĉu ci ricevas ĉiam sufiĉe por ĝissate manĝi?"-"Ne, Sinjoro. Ofte mi iras dormi kun malplena stomako."-"Kion ci faras tiaokaze, knabo mia?"-"Nenion, Sinjoro. Nur plori mi povas."-"Kie ci sternas la maton?"-"Maton mi ne havas."-"Kie do ci dormas?"-"Surgrunde, Sinjoro."-"Ĉu ne estas al ci tro malvarme?"-"Dum la vintro estas ege malvarme. Sed dum la somero ne estas ja tro malbone"-"Ĉu la homoj faras al ci malicaĵojn, kiam ci almozpetas en la urbo?"-"Kelkaj malbenas min kaj sakras, kiam mi alvenas, kaj la knaboj ĵetas ŝtonojn kontraŭ min."

La metioj de la blinduloj- Ĉar Antikveco nombris grandan proporcion da sklavoj, estas logike, ke egalproporcie blinduloj estis sklavoj. Kaj fakte Herodoto sciigas nin, ke la militkaptitoj blindigitaj de la Scitoj estis sklavigitaj. Ksenofono raportas pri la pezaj taskoj, al kiuj la blinduloj en tia stato estis truddevigitaj.

Por la plimulto de la nesklavoj, blindeco kuniĝis kun almozpetado: "blinda, almozpetanta, per bastono la paŝojn gvidanta", jen la vortoj de Tirezio (Sofoklo,"Edipo Reĝo"), kiam li anoncas la mizeron de Edipo. Ne alimaniere la Evangelio parolas, kiam ĝi priskribas la blindulojn apud la multe trapasataj lokoj sidantajn kaj almozpetantajn (Marko 10 46, Johano 9 1-8).

Se sklaveco kaj almozpetado estis la sorto por la plimulto de blinduloj, kelkaj, pli feliĉaj, fariĝis muzikistoj, kantistoj aŭ aedoj sufiĉe similaj al la mezepokaj trobadoroj; ĉu Homero parolas pri si mem ĉe priskribo de unu el ili, Demodocos laŭnome, petita kanti dum festeno: "La heroldo revenis alkondukante la fidelan aedon, inter ĉiuj amatan de la Muzo, kiu al li donis samtempe la bonon kaj malbonon. Ĉar ŝi senigis lin je vidpovo, favorante lin per la mildeco de la kanto."

La antikvuloj, aparte la Helenoj, opiniis, ke homo senigita je vidpovo estas pli sentiva al la mondo de spiritoj, ol la vidhavuloj; ne mirige do, ke la antikvaj tempoj nombris plurajn blindajn divenistojn, el kiuj la plej fama estas Tirezio, grava rolulo de pluraj helenaj tragedioj. Aliparte Egiptio havis plurajn vidhandikapitajn suverenojn; laŭ J. Omlin, kiu baziĝas sur tre realisma ikonografio, Nefertiti; fama edzino de Amenofis la 4-a suferis je okulmalsano, eble ŝi estis unuokula. Herodoto siaflanke mencias du blindajn faraonojn.

Sinteno rilate al la blinduloj-

La ĉi supre menciitaj respondoj de Rasul estas tre signifoplenaj pri la sinteno de la Antikvuloj koncerne la blindulojn. Krom la timataj reĝoj kaj divenistoj, la ŝatataj aedoj, ili estis ĝenerale malŝatataj, malestimataj kaj forĵetataj. Tia sinteno facile kompreneblas, se oni memoras, ke blindeco ofte ligiĝis kun dia puno. Ĝi estis taksata malbeno. Tiu malakcepta fenomeno akiris apartan akrecon en la intertestamenta kaj rabena judismo, en kiu oni estis stariginta leĝecan sistemon rilate al la meritoj kaj faroj, do repagojn. Ekzemple diras la Miŝna (parto de la Talmudo):" Ĉiu juĝisto, kiu ricevos donacon kaj fortordos la juron, ne povos maljuniĝi sen suferi okulan malklariĝon". Ne mirige do, ke la rabeno Nathan parolas pri la blindulo, kiel pri "tiu, kiu kulpas ĉiujn mondajn abomenaĵojn". La Fariseoj,kontraŭuloj de Jesuo, uzas similan vorton pri iu blindulo de Kristo resanigita: "Nur peko ci estas, de cia naskiĝtago"

Tia malŝato al la blinduloj manifestiĝas en la tuta antikva Mezoriento.Estas signifoplene, ke plurajn jarcentojn poste, Alaho estos devigita admoni Mahometon, pro preteratento, favore al riĉulo, de blindulo veninta al li strebe al vero.

Ne nur blindeco estis malbeno. Por la trafito ĝi konsistigis makulon farantan el li duarangan homestaĵon. La babilona talmudo sciigas nin, ke la blinduloj estis liberigitaj de pluraj laŭleĝaj devigoj, samstatuse, kiel la infanoj. Notindas tamen, ke la sama traktaĵo parolas pli sube pri blinda rabeno. La esena sekto en Qumran (apud la Morta Maro), kies famajn manuskriptojn oni trovis en 1947, ankaŭ taksis la blindulojn "sub-homestaĵoj", tial, ke ĝi ne akceptis ilin.

Ekskluzivitaj estis la blinduloj de la pastraj funkcioj en Izraelo. La pastroj ludis peran rolon inter Dio kaj homoj kaj devis esti korpe kaj mense perfektaj por alproksimiĝi al la dia potenco. Same estis en Babilono, kie oni retrovis la jenan priskribon:" (nur) pastrido, de sana patro naskita, perfekta laŭ staturo kaj mezuroj, rajtas aperi antaŭ Samas kaj Agad, sur la loko por divenado kaj orakolo. Koncerne la filon de klarvidulo, kies patro ne estas sana, kies okuloj estas senrigardaj, dentoj frakasitaj, fingroj stumpaj, testikoj malsanaj...li ne rajtas plenumi la ritojn de Samas kaj Agad".

Se la blinduloj estis fakte repuŝataj, Antikveco tamen liveris al ni kelkajn belajn gestojn, kiuj ekĵetas lumradion en la mallumon. Suetono raportas, ke la senatano Gallus Terrinius, post abrupta blindiĝo, ne plu havis emon eliri kaj decidis forlasiĝi, mortonte pro malsato. La imperiestro Aŭgusto lin vizitis kaj konsolis kaj redonis al li vivemon.

Sed la homestaĵo plej famkonata pro konstanta subtenado al la malriĉuloj kaj malfortuloj, tiu,kiu, petadis, ke oni respektu la neskribitajn leĝojn pri pietato, jen Antigona, al ni prezentata de la helenaj tragediistoj en pluraj teatraĵoj. En "Edipo en Kolono", Sofoklo ŝin montras al ni, ununura gvidantino por blinda patro de ĉiuj malbenita, lia ĝismorta prizorgantino. Sed teatra figuro, ŝi nur malmulte stampis la antikvulan pensmanieron. Estas necese atendi la disvolvadon de Kristanismo, por ke estu enkondukata profunda ŝanĝiĝo en la sinteno rilate al la blinduloj.

(Alain Decoppet - tradukis S. Boniol)

Albert Camus

Li ĝuis prestiĝan gloron, senĉese ĝenatan de demandantoj; li estis famiĝinta kiam amaso da gejunuloj, eliĝante el halucina sonĝo, kvazaŭ blindopalpe serĉadis imitindulojn. Tamen, li ĉiam rifuzis tiun titolon: "porpensa majstro". "Por instrui, scio necesas; por regi, necesas sinrego". Kiu do li estis? Albert Camus, filo de la suno, de mizero kaj de morto. Ĉu intelektulo? Jes, se intelektulo estas tiu, kiu rigardas sin vivanta. Ĉu artisto? Jes, sed antaŭ ĉio plenvivemulo, fidelulo, kiu, kvankam konscianta, pri la absurdeco de la mondo, tamen decidis al ĝi korligiĝi. La hazardon de sia vivo li igis alvokiĝo. El lia fideleco al la homa grado, tiom da homoj tiras sian ĉefan moralaĵon.

La absurdo- Jen vojo: de Sens al Parizo; jen platano; jen dato: la 4-an de januaro 1960; jen horo: la 13-an kaj 55 minutoj; okazas la nupto de Albert Camus kun la morto. Ĝi estas neeviteble komparenda kun la sablero, kiu eniĝas en la universan harmonion, kaj grincigante la meĥanikon, fariĝas ĝia ĉefa motoro. Tiu sablero nomiĝas la absurdo, kiun Camus senmaskigas kaj konfesigas al la homoj mistifikitaj de la ĥimero pri neŝancelebla kosmo, spite kelkfoje konsterniĝajn ŝajnojn. Nu, kun tiuj ŝajnoj oni devas kalkuli. Tragedia simileco inter la absurdo kaj la morto de Camus...

Camus konsciis, ke sensenca estas tiu sencela kaj senespera agitiĝado, senutilaj la suferoj, tio estas: de kiu, kial ni estas kondamnitaj? "La absurdo naskiĝas el la konfrontitaj homa alvoko kaj monda senbaza silento". Kiel de nun vivi plu, kiam oni malkovris la senzorgemon de ĉio? Sed per sinmortigo, la homo povas nur sin kaj ĉion pereigi. Nur vivante per soleca klopodo li atestos, tagon post tago, sian nuran verajon, tiun defion:" Vivi estas vivigi la absurdon. Ĝin vivigi estas unue ĝin rigardi."

La enradikeco- La "Mito de Sizifo" ne estas la "Maksimoj" de La Rochefoucault. Kvankam konsciante pri la maljusteco de la mondo, Camus ĝin ne malpli amas pro tio. Li ĝuas la nunan momenton, la senton, la riĉecon de la mondo. En Tipasa, la unuan fojon, li komprenas, ke lia "tuta reĝolando situas en tiu-ĉi mondo";

"Sub la suno de l'mateno, granda feliĉo balanciĝadas en la spacego...



TIPASA

Mi tie-ĉi komprenas, kion oni nomas radieco: la rajton ami sen mezuro Estas unika amo en la mondo. Ĉirkaŭ-premi virinan korpon, tio estas ankaŭ teni ĉe si tiun strangan ĝojon, kiu fluas de la ĉielo mal-supren al la maro... Malvarmetas la venteto kaj bluas la ĉielo. Tiun vivon mi amas senzorge kaj pri ĝi volas paroli libere. Ĝi igas min fiera je mia homa rango. Tamen, tion oni ofte diris al mi: "nenio indas fierecon". Io indas ja: tiu suno, tiu maro, mia koro pro juneco bateganta, mia korpo

salgusta, kaj la vastega panoramo sur kiu karesemo kaj radieco kuniĝas en flavo kaj bluo."(Nupto en Tipasa)

La verkaro de Camus esprimas la ekfrapon, la blindigon ricevitajn de ĉiu ajn homo en Alĝerio. Ĉu tero benita de la dioj? Ne, ĉar en Alĝerio, ne ekzistas la dioj. La deziro mem je dio forestas. Nur la tujan ĝojon, malplenan je metafizika enteno, la nunan momenton, la dumon, "kiam tagmezo ŝvebas en la ĉielo."

La historio- La juneco, la maro, la suno ne forigas el lia verkaro mizeron kaj historion; ne pro tio, ke mizero lin multe ĝenis:" Mi ne scipovas posedi... mi estas avara pri tiu libereco, kiu svenas ekde kiam komenciĝas la troeco de bienoj." Sed eĉ se li ne uzis pri si la vorton "mizero", tiu-ĉi restas la signo de la homa rango, kiu postulas batalon kontraŭ tiuj blindaj fortoj: maljusteco kaj premeco. Camus ne ignoris historion, tiun "ekstreman klopodon de la estuloj por realigi la plej akravidajn el siaj revoj." Camus inter mizero kaj suno ekkomprenis sian nuran postulon, ke ĉiuj al la lumo altiĝu, sed ankaŭ, ke kontraŭ historio estu gardata parto de la homo: "ĉar estas historio, kaj estas io alia, la simpla feliĉo, la pasioj de la estuloj, la beleco de la naturo", enradikiteco, kiun historio ignoras, sed ankaŭ por kiu necesas batali. Fidela al duobla alligiteco: al beleco kaj al la humiligatoj, Camus estis konvinkita, ke "nei parton de tio, kio estas, ne diferencas de la neado je sia propra esteco, de la akcepto de prokura vivo."

La verko kaj la arto- Tiu mizera kaj luma mondo elfontigis lian genion; estante dudekjara li verkis "La posta kaj la antaŭa flankoj", pri tiu duobla aspekto de la mondo. Lia tuta verko elvolviĝas inter la absurdo kaj la ribelado. Unuflanke, en "La Mito pri Sizifo", "La Fremdulo" aŭ "Caligula", la homo ekkonscias, ke li estas fremda en mondo ne por li farita; "La homoj mortas kaj ne estas feliĉaj." Aliflanke, en "La homo ribelanta", "La pesto" aŭ "La Justuloj", ĉiuj homoj spertas la absurdon, ĉar ili kune suferas pro la distanco inter ili kaj la mondo. Sed Camus, kvankam ne malestimanta la ribeladon, nek malagnoskanta la agadon, laŭdas kaj postulas mezuremon:" necesas agi homece kaj, ĉion dediĉi al la nuna tempo, estas pli malavare ol sin turni al la venonta." Ĉi-tie la artisto devas agadi rifuzante esti dio. Nur li "ne rifuzante tiun batalon, rifuzas kuniĝi kun la regula armeo". Li estas la "liberpafanto". Laŭ Camus la moderna artisto estas ribelanto, kiu pentras la realaĵon travivitan kaj suferitan. Sed, se lia ribelado estas nur detruado, li riskas trafi alispecan sterilecon. Li sin strecas por sin altigi, sed ne atingas la homojn. Paroli al la homoj estas diri al ili: plezuro, suno, lukto kontraŭ la morto, kaj diri tion verece. Ribelante kontraŭ la mondo, Camus intencas ŝanĝi la formon de ĝi, sed el la mondo, kia ĝi estas. Nek tuta rifuzo, nek tuta konsento, tia estas lia sinteno ankaŭ dum la alĝeria milito. Li aliĝis al neniu partio. Kiu verkisto kuraĝus prediki pri virto? La celo de arto ne estas leĝado kaj juĝado, sed komprenado:" Vereco estas mistera, glitema, ĉiam konkerota. Libereco estas danĝera, malfacile travivebla tiom, kiom ekzalta."

Eĉ se Camus evidentigis la absurdecon de la mondo, li tion faris kun ne elrevigita rigardo. Tiu evidentigo ne estas neado. Plie, li estis fidelulo al tiu tero de la nuntempo, tero de vivantoj, sed silenta, por ĉiam, pri la bagatelaj postmortaj okazontaĵoj kaj iu ajn klarigo pri vivo kaj morto; por la homa agado li elektis justecon, ne tiun teruran, abstraktan pasion, kiu mortigante liberon tiom da homoj kripligis, sed senprokraste porhoman justecon, ĉar kio estus justeco sen la alproksimiĝo al la feliĉo?

D. Levy kaj M.T. Juchault

(artikolo jam aperinta okaze de la 50-a datreveno de la naskiĝdato de Camus)

Proverbaj fiŝoj en verda akvo - B. GOLDEN

Ofte estas publikigitaj en Esperantaj periodaĵoj listoj da proverboj en Esperanto, sed ili kutime ne estas sisteme aranĝitaj laŭ temoj por ilustri variaĵojn de la sama proverbo, por reliefigi proverbojn kun kontraŭdira senco kaj por montri similecon inter la esprim-maniero de diversaj kulturoj (1). Escepto estas mia prezento de kvindeko da proverboj pri Dio, kiujn mi analizis laŭ konceptoj (2). Nun mi volas doni similan traktadon al saĝaj eldiroj, kies ŝlosilvorto estas "fiŝo". Mi uzis, kiel fontojn la kolekton da proverboj tradukitaj de d-ro Zamenhof, la hungaran-esperantan frazeologion de Csiszár kaj Kalocsay, kaj kompilaĵon de proverboj en finnugraj lingvoj (5). La registraĵoj en ĉi-lasta verko ne havas Esperantajn tradukojn; do mi esperantigis ilin surbaze de tradukoj en aliaj eŭropaj lingvoj. Mi provis krei plaĉan aŭdefekton per la uzo de metrikaj rimedoj, kiel la aranĝado de silaboj, akcentoj kaj rimoj, same kiel faris d-ro Zamenhof.

1- Scio kaj lerteco- Al la fiŝo ne instruu naĝarton (Z:44)
Fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo (Z:599)
Fiŝo granda naĝas profunde.(Z:596)
Ekzistas ezoko, ke fiŝeto ne dormu (Z:443)
Fiŝo pli granda malgrandan englutas.(Z:598)

2-Bona kaj malbona vivo- Vivi kiel fiŝo en akvo (DF)
Esti kiel fiŝo en akvo (PIV)

Komparu jenajn zamenhofajn proverbojn: Vivi kiel kuko en butero.
Esti en sia elemento.

Barakti kiel fiŝo ekster la akvo (Z:145)
Barakti kiel fiŝo kontraŭ glacio (DF)

3-Kvalitoj - Ĝi estas nek viando, nek fiŝo (Z:688)
Eĉ perĉo en la propra niĉo estas traktata, kiel fiŝo.
Putrado de fiŝo komenciĝas de l'kapo (Z:2127)

4-Fiŝoj kaj homoj- Infanoj kaj fiŝoj voĉon ne havas (Z:753)
La gasto estas kiel fiŝo,li ne longe restas freŝa (DF)
Gasto, kiel fiŝo baldaŭ fariĝas malfreŝa (Z:652)
Kaj fiŝoj kaj gastoj la trian tagon komencas stinki.

5-Atingo de celoj- Fiŝo serĉas dronon, homo serĉas bonon (Z:601)
Fiŝo serĉas profundon, homo serĉas abundon (Z:602)
Fiŝo ne iras, sed hoko ĝin tiras (Z:597)
La fiŝon, kiun vi celas kapti, ja tiun vi sukcesos hoki.
Ne ĉiu fiŝĉasanto kaptas fiŝojn.
Ne ĉiu fiŝĉasanto fariĝos fiŝkaptinto.

Komparu la zamenhofan proverbon: Ne ĉiu aspiranto devas esti prenanto.

Por la enhavo de via reto oni ne pagas, dum la fiŝo ankoraŭ profunde en akvo naĝas.
Ne fanfaronu pri fiŝo sur via hoko, dum ĝi ankoraŭ estas funde de la akvo.
Ankoraŭ la ezoko ne estas sur la hoko (Z:99)
La manĝota fiŝo estas ankoraŭ en la rivero (Z:1262)
Pli bona perĉo en la sako ol plateso en la imago.
Malgranda fiŝo sur via telero valoras pli ol granda en rivero.
Ankaŭ la kato ŝatas fiŝon, sed al la akvo ne iras proksimen.
Fiŝi en malklara akvo kondukas al bona sekvo.

Komparu jenan version el Plena Ilustrita Vortaro
Fiŝi el malklara akvo (profiti el senorda situacio).

6- Akirado kaj konsumado- Por kapti ezokon bongustigu la hokon (Z:2028)
Se vi bezonas fiŝon sen ostoj, iru kapti ĝin sub pinarbo.
El fiŝo malmultekosta venas supo malbongusta.
Al fiŝ' kuirita jam akvo ne helpos (Z:27)
Ju pli da kuiristoj ariĝas, des pli la fiŝsupo maldensiĝos.
Fiŝo volas naĝi (Z:603)

Plena Ilustrita Vortaro aldonas: "postulas trinkadon".

Fiŝo sen vino estas veneno (Z:600)

Notoj kun sigloj- 1. POTTS Bertram. El "Proverbaro Esperanta". Kontakto 1987
BRENNAN Anna. "Ĉu veraj proverboj povas ekzisti en Esperanto?" Kontakto. 1987.
2- GOLDEN Bernard. "Proverboj pri Dio"; Kontakto 1987
3- ZAMENHOF L.L. "Proverbaro Esperanta" (Siglo: Z)
4- CSISZÁR, Ada; KALOCSAY Kálmán. "Domfabriko". 6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-esperantaj (Siglo: DF)
5- PACZOLAY Gyula."Magyar-Észt-Német-Angol-Finn-Latin Közmondások és Szólások. Veszprem. 1987.

****

LASTATEMPE

APERIS

Parte okaze de la jubileo de esperanto, oni notis la aperon de pluraj gravaj verkoj:

- "Aŭstralia antologio", en la serio Oriento-Okcidento de UEA. 431 paĝoj; trarigardo de romanoj, noveloj, poemoj, eseoj, kantoj kun biografioj.

- "Itala antologio", literatura panoramo de la 13-a jarcento ĝis la 19-a jarcenta itala literaturo; 477 paĝoj.

- "Angla antologio" por la periodo 1800-1960, sekvo de la jam aperinta volumo pri la pli frua epoko; 432 paĝoj.

- "Antologio de la hebrea poezio"; traduko de J. Kohen-Cedek;268 paĝoj.

- "Laŭdo de l'stulteco" (1511) de Erasmo; tradukis Gerrit Berveling el la latina. Enkonduko de A. Goodheir.

- "Dresado de la megero" de Williams Shakespeare; traduko de Gerald C. Jervis.

- "Anne Frank ne estas de hieraŭ"; traduko de la nederlandlingva libro de Mies Bouhuys, fare de Nora Bartels.

- "Sub la signo de socia muzo", antologio de poemoj kaj eseoj antaŭe aperintaj en "Monato". Redaktis William Auld kaj Stefan Maul.

- "Pandemonio"; noveloj kaj sciencaj artikoloj verkitaj de diversaj junaj hispanaj aŭtoroj.

PAĜO DE LA GEKNABOJ

LULO KAJ NULLANDI (1)

Aŭstralia indiĝena legendo

Antaŭ longe, antaŭ ol la luno brilis, ĉie estis mallumaj malgajaj noktoj. Lulo, la Malgajulo kaj lia edzino kuŝis apud la fajro. Lulo diris:" Mia koro estas simila al la mallumo. La nokto estas malamiko. Post morto,niaj spiritoj marŝos en senfina senluma nokto. La vento blovos tra malplenaj spacoj kaj niaj spiritoj velkos, ŝrumpos: ni neniiĝos."

La edzino aŭskultis kaj ploradis.

Nullandi la Feliĉulo kaj lia familio ĉirkaŭis sian fajron. "Vidu la mallumon" diris Nullandi." Niaj okuloj ĝuas ripozon post la fortega sunlumo dumtaga."
"Malsaĝulo!" respondis la edzino. "Kiel ni povas vidi la mallumon? Estas nenio videbla. Estas kvazaŭ ni metus la manojn antaŭ fermitajn okulojn."
" Ĉar vi ne rigardas!" Nullando diris. "Rigardu la fajron, edzino, gefiloj; vidu la flamojn, kiel ili saltadas! Rigardu! Nun, rigardu la mallumon; kion vi vidas?"
"Ni vidas flamojn en la mallumo!" ili kune kriis. "Kial, patro? Ĉu estas multaj fajroj ĉie en la mondo?"
"Ne, ili estas en viaj kapoj. Estas pli grave, ke ili estu tie ol en la mondo. Ĉu vi ankoraŭ vidas ilin?"
" Ili velkas, patro" - "Do rigardu al la ĉielo. Kion vi vidas?"
"Multmultajn fajrerojn sur la ĉielo. De kiu fajro venas tiuj?"
"Ili estas fajreroj de la fajrego, kiun Bajami bruligas. Kiam venos tagiĝo, ni vidos ties flavan lumon."
" Sed kial la fajreroj disĵetiĝas sur la ĉielo, patro?"
" Mi ne povas klarigi tion. Atendu ĝis vi iĝas gemaljunuloj kaj viaj spiritoj ekvojaĝas al Bullima. Vi ekscios multajn misterojn. Nun rigardu! Mi estos Bajami por vi."

Li prenis ŝtipon el la fajro kaj svingis ĝin forte tra la aero, tiel ke ĝi iĝis cirklo de flamo kaj fajreroj disflugis kvazaŭ vivaĵoj.

" Bis! Bis!" kriegis la infanoj, kiam Nullandi enĵetis la brulaĵon ree en la fajron.
" Ne," diris la patro severe." Tio estis nur ia ŝerco, kiun mi ne rajtas fari, ĉar neniu homo rajtas esti Bajami. Nun, endormiĝu, kaj matene la varmeco de la fajro vekos vin al la mirinda mondo de lumo kaj koloro."



Onklino Ĝina, el Aŭstralio

La Ŝnureto

... Sur la placo de Goderville estis multaj alvenintoj, tumultego de homoj kaj bestoj miksitaj. La kornoj de la bovoj, la altaj harĉapeloj de la riĉaj kamparanoj kaj la kufoj de la kamparaninoj elmontriĝis ĉe la supra surfaco de l'kunvenintaro. Kaj la akraj, blekantaj kriaĉantaj voĉoj konsistigis daŭran kaj sovaĝan bruadon, kiun superis kelkfoje granda ekkrio eligita de l'fortika brusto de gaja kamparano aŭ la longdaŭra muĝado de bovino ligita al doma muro. Ĉio tio odoris, kiel stalo, lakto kaj sterko, kiel fojno kaj ŝvito, eligis tian odoron akran, aĉan, homan kaj bestan, propran al la vilaĝa atmosfero.

Mastro Hauchecorne el Bréauté estis ĵus alveninta en Goderville kaj li sin direktis al la placo, kiam li ekvidis surtere peceton de ŝnuro. Mastro Hauchecorne, ŝparema, kiel vera normando, pensis, ke ĉio estas forpreninda, kio estas uzebla; kaj li sin klinis, kun peno, ĉar li suferis pro reŭmatismo. Li prenis de l'tero la maldikan ŝnurpecon kaj li estis ĝin zorgeme rondfaldonta, kiam li rimarkis, staranta sur la sojlo de sia pordo mastron Malandain, la selfabrikiston, kiu lin rigardis. Iam antaŭ longe ili ĉikanis pri kolbrido kaj poste restis malamikoj, sekve de sia malpardonema karaktero. Mastro Hauchecorne estis kaptata de certa honto, ke li estas tiel vidata de sia malamiko, serĉante pecon de ŝnuro en la fekaĵa koto. Li vivmove kaŝis sian trovaĵon sub sian bluzon kaj en la poŝon de sia pantalono; post tio li ŝajnigis serĉi surtere ion, kion li ne trovis, kaj li sin direktis al la vendoplaco kun antaŭenigita kapo, forte kliniĝante pro siaj reŭmatismaj doloroj.

... Ĉe Jourdain la granda ĉambro estis plena de gastoj, same kiel la vasta korto estis plena de ĉiurasaj veturiloj: ĉaretoj, benkveturiloj, kabrioletoj, duradaj veturiloj, nedifineblaj transportiloj flavaj je koto, misformiĝintaj, riparaĉitaj, levantaj al la ĉielo kvazaŭ du brakojn, siajn timonojn, aŭ kun la nazo surtere kaj la postaĵo en la aero.

Tuj apud la altabliĝintaj manĝantoj la grandega kameno, plena de helaj flamoj, ĵetis vigligan varmon al la dorsoj de la dekstra vico. Tri pikstangoj turniĝis, ŝarĝitaj per kokidoj, kolomboj kaj ŝaffemuraĵoj, kaj ĝuiga odoro de rostita viando kun ora-bruna krustigita haŭto eliĝis el la kamenfajrejo, naskis gajon, alfluigis salivon en la buŝojn.

La tuta plugila aristokrataro manĝis tie, ĉe mastro Jourdain, gastejestro kaj ĉevalkomercisto, maliculo, kiu havis ormonerojn. La pladoj pasis, malpleniĝis same kiel la lignokruĉoj de flaveruĝa cidro. Ĉiu rakontis siajn aferojn, aĉetojn kaj vendojn. Oni estis scivola pri la rikoltoj. La vetero estas bona por la legomoj sed malfavora por la grenoj.

Subite, la tamburisto batadis en la korto antaŭ la domo. Ĉiuj tuj surpiediĝis escepte de kelkaj nescivolemuloj, kaj kuris al la pordo, al la fenestroj, kun la buŝo ankoraŭ plena kaj la buŝtuko en la mano. Fininte sian tamburadon, la anoncisto elĵetis per seka voĉo, misritmigante siajn frazojn: "Estas informataj la enloĝantoj de Goderville kaj ĝenerale ĉiuj personoj ĉeestintaj la foiron, ke estis perdita ĉi tiun matenon sur la vojo al Beuzeville, inter la naŭa kaj la deka horoj,monbiletujo el nigra ledo, enhavanta kvincent frankojn kaj aferajn dokumentojn. La trovinto bonvolu alporti ĝin al la urbodomo senprokraste, aŭ al mastro Fortuné Houlbrèque, en Manneville. Rekompenco de dudek frankoj estas promesita." Kaj la viro foriris.

...Kaj la manĝo finiĝis. Oni eltrinkis la kafon, kiam la ĝendarma brigadestro aperis sur la sojlo. Li demandis:" Ĉu mastro Hauchecorne

estas tie ĉi?" Mastro Hauchecorne, sidanta ĉe la alia ekstremo de la tablo, respondis:"Jen mi estas." La brigadestro daŭrigis:" Mastro Hauchecorne, bonvolu havi la afablon min akompani al la urbdomo? La sinjoro urbestro volas paroli kun vi." La kamparano, surprizita, maltrankvila, eltrinkis per unu gluto sian glaseton da brando, leviĝis kaj ankoraŭ pli kurba ol en la mateno, ĉar la unuaj paŝoj post ripozo estis la plej dolorigaj, li ekiris ripetante: "Jen mi venas, jen mi venas." Kaj li sekvis la brigadestron.

La urbestro lin atendis, sidante en fotelo. Li estis la loka notario, homo dika, gravmiena, malavara je pompaj esprimoj. " Mastro Hauchecorne, oni vidis vin ĉi tiun matenon, kiam vi trovis, sur la vojo al Beuzeville, la monbiletujon perditan de mastro Houlbèque". La kamparano, kvazaŭ paralizita, rigardis la urbestron, jam timante pro tiu suspekto, kiu pezas sur li kaj kies kialon li ne komprenas. "Ĉu mi ektrovis tiun monbiletujon?- Jes, vi mem.- Mi eĉ nenion sciis pri tio.- Oni vin vidis.- Nu, kiu do min vidis?- S-ro Malandain, la selfabrikisto."

Tiam la grizulo rememoris, ekkomprenis kaj aldonis, ruĝiĝanta pro kolero:" Ha! Li min vidis, tiu aĉulo, li min vidis ektrovi ĉi tiun ŝnuron, jen, sinjoro urbestro."

Kaj serĉinte en la fundo de sia poŝo, li tiris el ĝi mallongan ŝnurpecon. Sed la urbestro malkredeme movis la kapon." Mastro Hauchecorne, vi ne konvinkos min pri tio, ke s-ro Malandain, kiu estas fidinda homo, kredis tiun fadenon paperujo." La kamparano, furioza,levis la manon, kraĉis flanken por atesti pri sia honoro kaj ripetis:" estas tamen la vero de l'bona Dio, la sankta vero, sinjoro urbestro. Je mia animo kaj savo, mi ĵure ripetas." La urbestro daŭrigis:"Post kiam vi trovis la objekton, vi eĉ ankoraŭ traserĉis dum longa tempo en la koto, ĉar eble iu monero povus esti falinta el ĝi."

La kampulo sufokiĝis pro indigno kaj timo. " Ĉu eblas diri tion! ...Ĉu eblas diri tion!...tiajn mensogaĵojn por senhonorigi honestulon! Kiel ajn, kiom ajn li protestis, oni ne kredis lin. Li estis kontraŭstarigita al s-ro Malandain, kiu ripetis kaj konfirmis sian aserton. Ili insultis unu la alian dum unu horo. Oni esploris, laŭ propra peto de mastro Hauchecorne, lian tutan veston. Oni trovis nenion. Fine la urbestro tute senkonsila lin liberigis, sciigante al li, ke li informos la prokuroron kaj petos ordonojn. La novaĵo estis disvastiĝinta. Elirinte el la urbdomo la grizulo estis ĉirkaŭata, pridemandata kun scivolo serioza aŭ mokema, sed en kiu montriĝis neniu indigno. Kaj li komencis rakonti la historion pri la ŝnuro. Oni ne kredis lin. Oni ridis. Li iris, haltigate de ĉiuj, haltigante siajn konatojn, senfine rekomencante sian rakonton kaj siajn protestojn, montrante poŝojn elturnitajn por pruvi, ke li nenion havas. "He, la maliculo!"

En la morgaŭa tago, ĉirkaŭ la unua pottagmeze, Marius Paumelle, servisto de mastro Breton redonis la monbiletujon kun ĝia enhavo al mastro Houlbèque. Li pretendis, ke li trovis la objekton sur la vojo; sed ĉar li ne scipovas legi, li donis ĝin al sia mastro. La novaĵo disvastiĝis en la ĉirkaŭaĵo. Mastro Hauchecorne triumfis. La tutan tagon li parolis pri sia aventuro; li rakontis ĝin al la homoj, kiuj pasis sur la vojo; al la homoj, kiuj trinkis en la kafejo, kaj al la preĝejanoj tuj post la diservo...Sed oni ne montriĝis konvinkita. En la mardo de la posta semajno li iris al la foiro por rakonti sian aferon.... En la gastejo ĉeval- komercisto kriis al li: "Ja, ja, kredigemulo, mi ĝin konas, vian ŝnuron!"-" Sed oni retrovis tiun monbiletujon!"-" Silentu ruzulo. Unu trovas, alia redonas. Sekreta aranĝo senkulpigas." La kamparano sufokiĝis. Fine li komprenis...

... Ĉirkaŭ la fino de decembro, li ne plu ellitiĝis. Li mortis en la unuaj tagoj de januaro ripetante "Eta ŝnuret'. Sinjoro urbestro, jen ĝi estas."

El "Normandaj Rakontoj"
tradukis: Roland Dupuis


POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO

La ŝlosilvortoj estis:
Japanujo - konduktoro - Skandinavio - printempo - fromaĝo - giganto - pelt-mantelo - ĉapelo - salajro - Sigis-mundo - ekspreso.

La stranga ĉina proverbo trovota estis: " Feliĉa estas la popolo, kiu siajn grandajn virojn en la ĝusta tempo sen-kapigas".

KRUCVORTOJ



Horizontale: 1- Povas okazi per bastono, por reformi ies konduton. 2- Malhelpata, kiam ŝi emas ŝovi sian nazon en fremdan vazon (s.f.). 3- Subteno (s.f.) - Fama senpersistulo. 4- Birdido...sen vosto - Kerno (s.f.). 5- Arbitra dekreto. 6- Adverbo - Nemulte. 7- Fandvazo (s.f.) - Sur aŭtomobilo cirkulanta en la Ĉiela Imperio. 8- Inicialoj de iama Prezidanto de la Pariza Komerca Ĉambro (1876-1940).- Koralrifo 9- Procedo de dekoracio de arĝenta folio (s.f.)- Plenumi, kiam temas pri promeso. 10- Akuŝoscienco.

Vertikale: 1- Li ne estas eterna komencanto (s.f.). 2- Tiel aŭtenta, kiel la aliaj, kiam ĝi estas falsa- Metalo el la maloftaj teroj (s.f.). 3- Infekti- Interjekcio. 4- Esenca vorto, por la perfektigistoj (s.f.)- Spritaĵo. 5- Kemia simbolo de radio-aktiva metalo- Nomo de du usonaj ŝtatoj (s.f.). 6- La birdo kantas laŭ la sia (s.f.)- Fanatikulo. 7- Parolo eldirita de la Pitia (s.f.)- Ago de tiu, kiu sekvas per la okuloj skribitan tekston(s.f.). 8- Nigra por prepari la kasison- Konsistigi la supran parton de io.9- Manko de iniciato(s.f.)-Pronomo.

LA VIVO EN GRESILLON

KOMITAT-KUNVENO DE 23|10|88

Ĉeestis: S-inoj Bourot, Cheverry, Lenel, Vincent; S-roj D. Babin, P. Babin, Benistant, F. Boyet, H. Boyet, Dairon, Le Magadure, Lagrange, Mêtivier. Senkulpiĝis S-ino Bodereau.

La prezidanto prezentas raporton pri la someraj staĝoj. Kompare kun la rezultoj de la antaŭa jaro la nombro da tranoktadoj en 1988 estas preskaŭ la sama, se ni kalkulas aparte la ĉeestantaro de la Post-kongreso en SAT en 1987, kiu estis escepta. De tri jaroj la nombro da ĉeestantoj iom malkreskis ĉiujare; ne en 1988. La partoprenantoj venis el pli ol 20 landoj. Ĉiuj kontinentoj estis reprezentataj. Prelegoj kaj kursoj plaĉis, kvankam S-ino Cheverry rimarkis, ke, kiam okazis samtempe kursoj kaj prelegoj, multaj preferis la kursojn; eble ĉar ili konsideris, ke ili ne atingis sufiĉe altan lingvo-nivelon por utile ĉeesti la prelegojn. S-ino Vincent bedaŭras, ke, ĉijare, kiam aliĝintoj venis grupe, eĉ el ekterlando, ili tendencis "krokodili". Tamen, la nombro da ekzamen-provintoj kaj de sukcesintoj estis kontentiga.
Tendenco konfirmiĝis. Temas pri la malfacilo, eĉ nun neebleco, organizi ekskursojn per busoj. La vizitoj al la diversaj vizitindaj lokoj de la regiono okazas nun per privataj aŭtomobiloj en kiuj trovas lokon tiuj, kiuj ne posedas veturilon.

La financa raporto de la kasisto respegulas la raporton de la prezidanto: la enspezoj kaj elspezoj koncernantaj la pensionan flankon ne multe ŝanĝiĝis kompare kun la antaŭjaraj. Kompreneble oni apartigis la financajn rezultojn de la Postkongreso de SAT en 1987. Tamen la disponebla sumo estos malpli alta ol en 1987, ĉar la investoj kaj riparoj, deciditaj en 1987, sed faritaj kaj pagitaj en 1988 estis multekostaj. La disponebla sumo tamen ebligos la farbadon de la kuirejo kaj la refaradon de la salono: elektra sistemo, refarbado kaj tapetado. Se restos financa ebleco oni antaŭvidas la refaradon de la bariloj de la infan-ĝardeno.

Dum la komitat-kunveno, kiu okazis lastan junion, estis jam preparita la kalendaro de la venontjaraj staĝoj. Sed, pro gravaj ŝanĝoj en la horaro de la aŭtobusa linio Le Mans-Saumur, la komitato devas ŝanĝi tiun kalendaron.

31/03 - 07/04: Infan-renkontiĝo kaj pedagogia staĝo.
16-30/06: Internacia renkontiĝo kun nedeviga programo de kursoj.
02-17/07: kursoj kaj speciala preleg-serio pri la Franca Revolucio.
18-31/07: kursoj diversnivelaj kaj ekskursoj.
1-14/08: kursoj kaj speciala prelegserio pri Edmond Privat.
14-28/08: kursoj diversnivelaj.

Ker-Seminario "Eŭrogeneracio" organizita de TEJO kaj JEFO okazos 24-29/03.
La Kongreso de la Centr-okcidenta Federacio okazos la 06-08/05.

S-ro Babin konfirmas sian intencon eksiĝi de sia posteno de prezidanto en aprilo 1989, sed daŭre estos membro de la komitato ĝis la balotado de 1990, por intertempe helpi, se bezone, sian anstataŭanton.

La kunveno finiĝis je la 15-a horo.

La sekretario, Guy DAIRON.

DONACO

Anonima donacanto petis, dum la somero, ke speciala premio "Paul Neergaard" estu atribuita al "la plej bona sukcesanto en unuanivela ekzameno de la Franca Esperanto-Instituto". Gajnis la premion (100 f. da libroj): Roger Gailhanou de Tarbes. Dankon al la donacinto kaj gratulojn al la gajninto.

NOVA ABONPREZO

Ĝi estas nun 70 ff. Ni estis devigataj altigi ĝin pro la plurfoja altiĝo de la sendo-kosto dum la lastaj tri jaroj. Ni memorigas, ke ĝi estas baza abonprezo, kiu apenaŭ kovras niajn elspezojn. Se vi deziras, ke ni daŭre sendu la revuon al nepagipovaj landoj, mem altigu la sendatan sumon. Dankon.

****



NE PLU CERBUMU

NUR PETU LA KATALOGON DE NIA

Libro-servo

ADRESO:

J. VINCENT, B.P. 54, F-49150 BAUGE

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de Maupassant

esperantigis R. DUPUIS

bonega traduko de ĉefverko
(vidu eltiraĵon, paĝo 10)

Prezo : 36,00 FF

NIA KONKURSO

Jen la kvara, kaj lasta, parto de nia konkurso. Se vi, ĝis nun, ankoraŭ ne sendis viajn unuajn tri solvojn, vi scias, ke vi rajtas sendi la respondojn al la kvar partoj de nia konkurso samtempe. Sed ne forgesu, ke la limdato por la sendo estos **la 15-a de februaro 1989.**

Ni memorigas, ke la premioj estos :

1) 1 000 ff. por restado en Gresillon.

2) 500 ff. por restado en Gresillon.

3) 200 ff. por aĉetado de libroj ĉe nia libro-servo.

4) 100 ff. por aĉetado de libroj ĉe nia libro-servo.

5) 50 ff. por aĉetado de libroj ĉe nia libro-servo.

KVARA (kaj lasta) SERIO

1 — Trovu la respondojn. Facila ekzerco por la leganto, kiu atente legis tiun numeron de la revuo :

— Kiu estas « artisto » por Camus ?

— Kiamaniere la imperiestro Aŭgusto montriĝis bonkora ?

— Kiu skribis, ke « fiŝo sen vino estas veneno » ?

— Kiel mortis Elizabeta, unua edzino de Nigra Falko ?

— El kiom da landoj venis esperantistoj al Grésillon en 1988 ?

2 — En tiuj kvin titoloj de libroj mankas la vokaloj. Bonvolu kompletigi ilin kaj trovi la nomojn de la verkintoj, kies komencliteroj estas donataj :

— TRNS	L.
— Ŝ LST PŜTKRT	S. E.
— KN SSPC SPC	R. S.
— TR DZRT KJ PRRBR	H. S.
— L FRMT RB	I. N.

3 — Mi estas homo. Kiu mi estas ?

— Mi verkis biografiojn, legolibron, lernolibron,...

— Mia naskiĝlando estas grandparte montara.

— Mi prelegis pri Esperanto jam kiam mi estis 18-jara.

— Mi estis prezidanto de grava Esperanto-Organizo.

— Mi estis vicdelegito de Persio ĉe la Ligo de Nacioj.

4 — Vera aŭ ne vera ?

— La libro « Tri verkoj de Volter » estis tradukita de R. Schwartz.

— LIBE signifas « Ligo Internacia de Bonvolemaj Esperantistoj ».

— Gaston Waringhien prezidis la Akademion ek de 1963.

— La grava revuo « Monda Kulturo » publikigis nur originalajn verkojn.

— La lernolibro « Por la Praktikantoj » estis eldonita ankaŭ brajle.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10^{e}-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (15 us. dol.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (15 U.S. dol.).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN